Ĉefaj celoj de ILEI por la periodo 2009-2012

(La sekvaj celoj detaligas kaj ne anstataŭas la celojn difinitaj en la Statuto.)

- Altigi la kapablojn de la esperantista instruistaro

  diskonigi novajn teknikojn, organizi fakajn seminariojn...

- Akceli la universitatan agadon

  E-kursoj, projektoj, instrukapabligo, programoj UPN, UAM, AIS...

- Organizi, stimuli kaj katalogi la instruadon de Esperanto

  kunlabori kun ekzistantaj fortoj agantaj tiukampe

- Fortigi la instruistan trejnadon

  kunlabori kun ekzistantaj fortoj, evoluigi ligan programon

- Subteni kaj realigi interkulturajn projektojn

  Interkulturo, Flugiloj, IĈLM, Indiĝenaj Dialogoj, Comenius, AKEL...

- Starigi kaj subteni ret-kursojn

  emfazi eblojn arigi retlernantojn en fizikajn renkontiĝojn

- Kunroli en informaj kampanjoj prepare al kursoj

  lingvaj festivaloj, evoluigo de gvidiloj kiel anonci kaj okazigi kursojn

- Fortigi la eksterajn rilatojn

  UNESKO, FIPLV, ISAE, UMEA...

- Disvastigi la ILEI-agadon en ĉiuj kontinenoj

  projektoj, instruado, fondo kaj fortigo de sekcioj...

Pliaj celoj

Reekzameni ekzamenojn

  klarigi refoje la KER-ekzamenojn (UEA-ITK), cele al alpreno de nova liga sinteno
  klarigi kiel KER kaj la UEA/ILEI sistemo povas funkcii paralele kaj kial indas reteni ambaŭ

Pritaksi kaj katalogi lernilojn

  kunlabore kun edukado.net kaj laŭ aliaj vojoj

Ĉi tiu celaro formos la bazon por la trijara agadplano. Ekzistos ankaŭ laŭmonata plenumskemo.